

Augustin Wibbelt,  
Vespera ruĝo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Post sunsubir' ĉe la ĉiel'  
Luks-plenas roz-ĝarden'.  
Nebul' sin levas, nokt-malhel'  
En forsto kaŝas sin.

La pasintec', leviĝas ĝi  
Kun ĝoj- kaj malĝojad'.  
Malnovan linon ŝpinas mi,  
Ne haltas mia rad'.

*Traduko de la Basgermana poemo "Aobendraut" de AUGUSTIN WIBBELT (\*1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984-12-30.*

*MR-169-1 / Arg-681-1371 (2012-11-26 08:25:47)*

*Profesoro d-ro Hans Taubken, kunlaboranto kaj estrarano de la societo "Augustin Wibbelt", afable permesis al mi, Manfred Retzlaff, per retletero de l' 30.04.2008 la enretigon de miaj tradukoj de poemoj de Augustin Wibbelt. Vidu ankaŭ la retejon de la societo "Augustin Wibbelt": <http://www.muenster.org/wibbelt/>.*